

# FRANCA

PRIEURE SAINT-MARTIN  
77610 LA HOUSSAYE EN BRIE  
FRANCE

# KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★  
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro A. BESSIERE	28, rue C. Saint-Saëns	76000 ROUEN
Sekr: F-ino G. PREUX	55/3 Terrasse Rue du 11 novembre	59290 WASQUEHAL
Kasistino: S-ino J. VINCENT	26 bis, rue Milngavie	49150 BAUGE
Religia konsilanto: P-ro L. BOURDON	7, av. Salomon	59000 LILLE
Peranto IKUE: P-ro R. DEGRELLE	12, r. Estienne d'Orves	54490 PIENNES

C.C.P: Association Catholique Française pour l' Esperanto 2324 93 N ROUEN.

==== la m<sup>o</sup>: 8 F. Abono: 30 F (TTC). Kotizo: 10 F. Sumo: 40 F. ====

+++++

==== N<sup>o</sup> 172 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====

\*\*\* Sankta PIO X-a, preĝu por ni. \*\*\*

==== MARTO 1992 ====

+++++

## LE MOT DU PRESIDENT

Quand ce bulletin vous parviendra, nous nous préparerons à boucler notre valise pour prendre part à notre congrès annuel. Nous ne devons pas y arriver l' esprit vide, mais au contraire après avoir réfléchi au rôle de l' Eglise dans le monde, thème de nos travaux.

Malgré nos insuffisances, nous devons nous efforcer, avec l' aide de Dieu, de ne pas être des serviteurs inutiles, mais au contraire d' oeuvrer pour porter à nos frères humains le témoignage de notre Foi et les amener à Celui qui nous renferme tous en son amour infini.

A. B.

## LA BILETO DE LA PREZIDANTO

Kiam ĉi tiu bulteno atingos vim, ni estos pakontaj por partopreni en nia jara kongreso. Ni ne alvenu tien kun malplena menso, sed male pripensinte la rolon de l' Eklezio en la mondo, temo de nia laboro.

Malgraŭ niaj mankoj, ni devas klopodi, kun la helpo de Dio, por ne esti senutilaj servistoj, sed male por alporti al niaj homfratoj ateston pri nia Kredo kaj ilin konduki al Tiŭ, kiu tenas nin ĉiujn en sia senlima amo.

+++++

## PROVENCA PREGO

Donu al ni la kanton de la muelisto, la ĝojon de la naivulo, la bonecon de la pano, la bonan humoron de la vino, la flamon de la branĉofasko, la guston de la ajlo, kaj ke restu vivanta la floro de l' amikeco.

+++++

## TRADUKRONDO

Traduki tekstojn estas bona maniero perfektigi en Esperanto. Se vi tion deziras, vi povas aliĝi al nia tradukrondo. Ju pli da partoprenantoj, des pli interesa la kunlaboro, ĉar eblas kompari pli da tradukoj. Simple sendu vian nomon kaj adreson al la redaktorino de la bulteno.

PARDONU NIN, SINJORO

Sinjoro, ne forlasu nin,  
Ĉar ni estas pekuloj.  
Ho Dio de la ĉiutagaj pekuloj  
De la malbravuloj kaj senvaloruloj!  
Niaj kulpoj ne estas eksterordinaraj;  
Ili estas ĉiutaga polvo  
Kaj tiel ordinaraj,  
Ke oni preskaŭ forgesus ilin,  
Precipe se oni forgesas vin.  
Vi la plej sanktega  
Dio de la pekuloj,  
De la malfervoruloj  
Kaj indiferentuloj,  
Kompату nin!

Karl RAHNER SJ

BRETONA ABATEJO KRESKAS: SAINTE-ANNE DE KERGANAN

Filoj de S-ta Benedikto, en la lando de S-ta Anna, preĝas, laboras, gastigas kaj devas kreski.

"En ĉiu loko, agnoski sin sub la rigardo de Dio".

Prapatro de la ~~okcidentaj~~ monaĥoj, Benedikto de Nursio (480-547) verkis regularon, kiu larĝe diskonigis. Ĝi kontribuis en la formado de la ~~okcidentaj~~ kulturo kaj spirita fizionomio de Eŭropo, kiel atestas pri tio la multaj abatejoj dissemintaj tra tiu teritorio.

Fidelaj je sia devizo "PAX", la monaĥejoj disradias la pacon, kiu venas el Dio. La nuna mondo bezonas "animsuplementon", kaj la monaĥoj proponas al ĉiuj "spirita verdan spacon". Ili volas silente atesti pri la vivopleneco de la kristana heredaĵo por la daŭra unuiĝo de nia kontinento.

La monaĥo estas Diserĉulo. Li marŝas post Kristo, inter fratoj ariĝintaj ĉirkaŭ sia Abato, kies nomo vere signifas "Patro".

La tuta monaĥa familio celas, tagon post tago, la serĉadon de Dio en la kadro de liturgia preferata al iu ajn okupado, kaj de senĉesa preĝo, kiu vivigas ĉies laboron.

"Nenion preferi pli ol la amon al Kristo".

Fondita en 1897 de Solesmes, la Abatejo de Kergonan ~~okcidentaj~~ situas en Morbihan apud Carnac kaj Quiberon, en la radiado de S-te Anne d' Auray.

Du ekziloj bremsis ĝian kreskadon: unu en Belgujon, pro leĝoj pri religiaj kongregacioj (1901-1922), la alia en Mayenne, dum la dua mondmilito (1942-1946).

En 1914 tamen, la monaĥejo atingas la maturecon kaj iĝas Abatejo. La konstruado de la abateja preĝejo povis komenci nur en 1968. Ĝi estis soleme konsekrita en 1975. Ĝia simpla vasteco estas ja adaptita al la benediktana liturgia, konsistanta el nobleco kaj simpleco. Bona akustiko ebligas al la gregoria kanto disvolvi sian humilan belegon, tute internan.

"Ĉiuj gastejoj, kiuj alvenas, estas akceptendaj kiel Kristo".

"Preĝu kaj laboru!": tia estas la devizo de la benediktanaj monaĥoj. La monaĥeja tago dispartiĝas inter tiuj du okupadoj, sed la daŭra kaj dolĉa rilato kun Dio vivigas ĉiujn agojn de la monaĥoj. Spirita kaj mana laboro, per kiu ĉiu serĉas, laŭ la obeemo, la volon de Dio, kaj trovas ekvilibron por la servado de la komunumo. Lego, konstanta studo de la Sankta Skribaĵo kaj de la spiritaj realoj (lectio divina) nutras la preĝospiriton, dum diversaj agadoj ebligas al la monaĥeja familio harmonie funkcii kaj laborakiri: servadoj kaj prizorgadoj, fruktkultivado, ceramikateliero kaj religia librejo.

Ĉiuj estas invitataj rilati kun la monaĥoj en la paco de Dio laŭ pluraj akceptokondiĉoj: viziteto en la preĝejon kaj en la pordejon; ĉeesto en diservo, interparolado kun monaĥo aŭ konfesado; restado en la gastejo por viroj aŭ fraŭlgrupoj; somermerkredo, unutaga meditado.

"Meti en Dion sian esperon".

La nun disponeblaj ejoj de la Abatejo estas tro malgrandaj, kiel por la monaĥoj, tiel ankaŭ por iliaj vizitantoj. Por akcepti ĉiujn pasantojn, ni bezonas novan akceptejon, enhavantan ekspozicivendejon, vizitejojn, paroladejon.

.. / ...

Por la bezonoj de nia komuna vivo, ĉeloj, monaĥa manĝejo kaj kuirejoj estas antaŭviditaj.

Sen via helpo, ni ne povas havi sufiĉe por tiaj kreskoj.

Por efike helpi, vi povas sendi ĉekon je la nomo "Fondation des Monastères" rekte al Abbaye Ste-Anne de Kergonan B.P. 11 56340 PLOUHARNEL.

XX

LAUDO KAJ PROPETO

Ni ĝoje preĝu al la Sinjoro Jesuo Kristo,  
Pano de nia vivo:  
Benata estu Vi, Sinjoro, pro Via korpo kaj Via sango!  
Ho Kristo, Vi petis nin dankon diri memore al Vi:  
- gardu nin fidelaj en la celebrado de tiu mistero.  
Sacerdoto de la nova Alianco,  
Vi fordonis la perfektan oferon sur la kruhaltaro:  
- donu al ni la favoron oferi nin kun Vi en la fido.  
Vi, la manao veninta el la Ĉielo,  
Vi nutras la Eklezion per Via korpo kaj Via sango:  
- fortigu ĝin en ĝia irado al la Pateo.  
Vi estas la Pano sendita de la Patro por nia resaniĝo:  
- redonu la saĝon al la korpoj kaj animoj.  
Vi konfidis al ni la Eŭkaristion por anonci Vian morton kaj Vian reviviĝon:  
- donu la eternan vivon al tiuj, kiuj atendas Vian revenon.  
Sinjoro Jesuo Kristo, en tiu admirinda sakramento,  
Vi lasis al ni la memoraĵon pri Via Pasio;  
faru, ke ni kultu per tiel granda amo  
la misteron de Via korpo kaj Via sango,  
ke ni povu senĉese ricevi  
la frukton de Via Elaĉeto.  
Vi, kiu regas en la jarcentoj de l' jarcentoj.

Amen.

XX

LA INFANO DE LA LAGO "PERKOJ"

La lago "Perkoj" estis malbenita, hantita de la malbonaj Ĉieluloj. Iun tagon aŭ pli bone iun nokton, infano estas ĉe la fenestro kontemplanta la stelo-plenan Ĉielon; subite, ĝi vidis grandan stelon fali el la firmamentaj nuboj;

La orvosta kometo falis pli kaj pli proksimen por fine malaperi en la krutâ cirko de la malbenita lago situanta meze de la montaro. Mirigita, la infano volis retrovi sian perditan stelon. Forlasante sian ĉambron, kurante tra la arb-aro, eskaladante la rokojn, transpaŝante la rivereton, ĝi alvenis antaŭ la lagon.

Ho! mirindaĵo! Ĝia malhela akvo trembrilis je lumo, ĝia fundo aperis plena je steloj; unu el ili pli granda, pli bela ol la aliaj altiris la infanon. Ĝi rekonis ĝin, volis ĝin tuj, ĉar ĝi estis ĝia propra falstelo; etendinte la brakojn al ĝi, ĝi falis en la profundan akvon de la malbenita lago. Ĝi ne plu reaparis.

Poste oni aŭdis el la lago Ĉielan muzikon; la libeloj dancis super la blua akvo de la lago. De tiam la lago "Perkoj" ekzorcita de la infano, kiu tiam admiris kaj amis la falstelon, ricevis la belan kromnomon "Stellago".

Alzaca legendo el la mezepoko.

XX

NIA MEMBRARO

Novaj membroj 1992: 1. S-ino LEVESQUE (Haute-Loire)

MEMBROJ BONFARANTOJ: 2. S-ino GUILLOT (Oise). 3. S-ro SANSON (Essonne). 4. S-ro LECOCQ (I & L). 5. S-ro LE MARQUAND (Manche)

Bonvenon al nia nova ano kaj tre koran dankon al la bonfarantoj, kiuj tre grave helpas al la kasa bonfarto. Ilia ekzemplo estas ja imitinda kaj sekvenda!

NEKROLOGO: Ni priploras la forpason de nia dumviva membro J.M. GUILLON el Orléans kaj sincere kondolencas al lia familio.

RECENZIO: "La pensée et l' action d' Edmond Privat (1889-1962)"  
 (Contribution à l' histoire des idées politiques en Suisse) Franclingve,  
 de Mohammad Farrokh. Eld. Peter Lang BERN. 21 x15cm 250 paĝoj.

\* \* \* \* \*

Malofte, homo ludis rolon kaj en esperanta mondo kaj en la ĝenerala politiko, ĉu nacia, ĉu internacia. Kaj eĉ pli malofte, aŭtoro, verkante biografion de konata politikisto, mencias lian esperantistecon aliel ol per hontema parentezo. Tial la eseo de Mohammad Farrokh meritas ne nur laŭdon sed atentan legadon.

Pri la vivo mem de E. Privat ni malkovras nenion novan, ĉar ni tamen bone konas nian pioniron. Ni scias, ke li aktivis ne nur en esperantio, sed ankaŭ en la svisa socialista partio, en pacismaj kaj federalismaj medioj, en Ligo de Nacioj ke li estis amiko de R. Rolland, P. Cérésolé, Gandhi, ke li batalis por la renaskiĝo de Pollando dum la unua mondmilito, ke li eksciĝis el "La Sentinelle", ĉar li defendis la sendependecon de Alĝerio en 1956...

La eseo de M. Farrokh estas serioza studo pri la psikologia kaj etika evoluo de E. Privat. Edukita kiel patrioto de sia ĝeneva kantono kaj kiel Sviso, lia internacia koncepto tre frue ampleksiĝis al tutmonda federalismo en tempo, kiam plej furiozis la naciismoj. Veninte el protestanta medio, li atingis fine de sia vivo, ĉe la kvakeroj, larĝan religian koncepton en kiu kunestis la okcidentaj kaj aziaj rigardoj, cele al supera homa kaj humana mondo. Oni tuj pensas pri la homaranismo de Zamenhof. Kaj tio ne estas koincido. Plurfoje M. Farrokh mencias kaj eĉ eksplicite klarigas la gravecon de esperanto kaj de la esperantismo en la spirito de E. Privat. Ĝi ja estis ĉefa, esenca etapo en lia vivo, vera revelacio, kiam li estis 16-jara.

La risko de la biografioj estas duobla: unuflanke, proponi legindan romanon, kiu atestu pri la imagopovo de la aŭtoro sed kaŝas la mankon de dokumentoj; aliflanke, prezenti sekan vicon de faktoj kun amaso da bibliografio, da referencoj, da piednotoj, kiu igas la tuton peza kaj nedigestebla. M. Farrokh evitis la du rifojn.

Ampleksa ja estas la dokumentado, sed ĝi estas librofine ordigita kaj neniel ĝenas la legadon; kaj la verko mem estas tia, ke oni daŭre sentas la vivantecon, la verecon de la ĉefrolanto.

La libro estas leginda por ĉiu leganto de la franca, plie ĝi estas montrinda por pruvi, ke esperanto estas ne nur la "helplingvo" de 1905, ne nur la hobbio de nedanĝeraj stranguloj, sed la portilo de etiko kaj humanismo.

Ne pli bonan konkludon mi povas doni ol la konkludon mem de la verko: "Lia idealo frudatiĝis je la malkovro de la internacia helplingvo kreita de Zamenhof, kaj ĝi kristaliĝis okaze de la unua universala kongreso de Esperanto en 1905. Ja ĝuste de tiu komenca impulso - la malkovro de Esperanto - disvolviĝis la universalisma penso de Privat..." (p. 142)

Recenzis G. LAGRANGE

oo

FINANCA RAPORTO POR LA JARO 1991

ENSPEZOJ	!	ELSPEZOJ	!
Kotizoj	5 270,00	! Bulteno	3 486,01
Donacoj	8 810,00	! Leterpapero	652,30
Rentum ĝparkaso	458,88	! Korespondado	623,90
Kongreso Amiens	9 875,00	! Vojaĝoj komitatanoj	1 470,00
Kongreso Francheville	1 730,00	! Sidejo U.F.E.	200,00
		! Kongreso Amiens	10 578,00
		! Diversaj	145,00
		!	
	<u>26 143,88</u>	!	<u>17 155,21</u>
En la kaso la 1/1/1991	13 499,51	! En la ĝparkaso	10 656,27
Pozitiva saldo	8 988,67	! En la p.Ĉ.k.	11 831,91
		!	
En la kaso la 31/12/1991	<u>22 488,18</u>	!	<u>22 488,18</u>

## LA KRISTANO ESPERANTISTO (daŭrigo kaj fino)

Kiel jam dirite, la katoliko esperantisto ne estas NUR disvastiganta baptito, kiu povas kreskigi la nombron de la abonantoj al nia periodaĵo. Fakte, la kristano esperantisto estas "tri-aspekta" esperantisto: sacerdoto (septembra bul-teno 1991), profeto (decembra), reĝo (ĉi tie). "Vi estas raso elektita, sacerdotaro reĝa...por ke vi proklamu la gloron de Dio, Tiu, kiu vokis vin el la mallumo en Sian lumon mirindan". (1 Petro: 2, 9).

### Principoj de la reĝeco.

La pozicia de la kristano estas mirinde kompleksa. Li devas samtempe partopreni: a) en la krea agado.

"Dio diris al ili:"Fruktu kaj multiĝu, kaj plenigu la teron kaj submetu ĝin al vi, kaj regu super la fiŝoj de la maro kaj super la birdoj de la ĉielo, kaj super ĉiuj bestoj, ĉiuj moviĝas sur la tero". (Genezo I, 28).

La baptito estas reĝo per sia inteligenta kaj libervola kunlaboro kun la Kreanto mem senĉese konstruanta la mondon.

### b) en la servo.

Eĉ post la malobeo de la homoj al sia donacema Kreanto, la homo restas Reĝo, sed alimaniere. Ek de tiu momento, la reĝeco de Dio la Filo kaj de la kristano ne efektiviĝas per povo, sed per servo, ne kiel Salomono, sed Kiel Davido. "Vi nomas min Majstro kaj Sinjoro, kaj vi prave diras, ĉar tia mi estas. Se do mi, la Majstro kaj la Sinjoro, lavis viajn piedojn, ankaŭ vi devas inter vi lavi la piedojn". (Johano 13, 13-14).

### c) en la difinita regno super ĉiuj vivformoj.

Dio anoncas la regnon, la alvenon de iu tempo, kiam la morto estos submetita al la vivo, kaj en ĉiuj kreitaĵoj, al la superregado de la Spirito de Dio. "Ĉio apartenas al vi, kaj vi al Kristo, kaj Kristo al Dio". (1 Kor. 3, 22-23).

### Praktikoj de la reĝeco.

Temas pri la partopreno, kion havas la baptitoj-laikoj en la reĝeco de Kristo, kiel reĝa aŭtoritato en la Eklezio mem. Sajnas, ke la respondo devas esti pure kaj simple negativa: "La kristana popolo esence regata kaj radike malkapabla ekzerci iun spiritan aŭtoritaton, ĉu rekte, ĉu delegacie", skribis spirita majstro en la 19-a jc: Dom Guéranger.

Sed la nura teoria diskutado pri la problemo estas aparte komplika. Multe pli simpla kaj evidenta estas la prezentado de la konkreta Tradicio de la katolika Eklezio. Tio povas resumiĝi en 4 ĉefaj punktoj:

#### 1) La rolo de la laikoj en la elektoj en la ekleziaj oficoj.

Jam en la 3-a jc., S-ta Cipriano menciis la voĉdonon de la popolo, kune kun la juĝo de Dio, la atesto de la kleruloj kaj la konsento de la aliaj episkopoj. La koncilioj (Orléans en 549 kaj Paris en 557), citas tiun principon de la papo Celesteno la 1-a: "Oni ne trudu iun episkopon al la popolo kontraŭ ties volo". La tre forta tradicio de la Eklezio ĉiam estis: unuigi kun la hierarkia principo, tiun de la komunuma konsento.

#### 2) La rolo de la laikoj en la koncilioj.

Tie, ili havas pozitivan kaj gravan rolon de konsento en la decidoj de la Eklezio kaj en ĝia hierarkia Registaro. La laikaro ankaŭ havas gravegan rolon de publikado kaj de diskonigado de la decidoj.

#### 3) La rolo de la eklezia komunumo por la regulado de sia propra vivo.

Tiu laika agado kelkfoje montriĝas, kaj diversa, kaj oportuna, kaj efik-ega. Ekz: la parlamenta agado de iu Winthorst, ĉefo de la katolika Centro de la germana Nacia Parlamento. Alia ekz: la jura laboro de Patro Las Casas, kiu defendis la homrajtojn de la Indianoj. Ankaŭ Patrino Tereza kaj ŝiaj religiaj Fratinoj helpantaj la plej mizerajn homojn en Hindujo kaj en iu ajn parto de la mondo. Ni ankaŭ povas admiri la plenan sindonon de Raoul Follereau, favore al la lepruloj.

#### 4) La rolo de la registara laboro de la Eklezio.

En la historio de la Katolika Eklezio, ni vidas 2 ĉefajn manierojn kon-tribui al la Registaro de la Eklezio: la administracio kaj la juĝo. En la adminis-tracia sektoro, la laikoj ĉiam havas multajn eblecojn kontribui al la praktika partopreno en la eklezia vivo: administri la financojn de la paroĥoj kaj de la paroĥestroj, eĉ de la diocezoj kaj de la episkopoj.

En la juĝa sektoro, ĉiu aparta kazo devas esti aparte diskutata. Tamen restas, ke la partopreno de la laikoj en la juĝorajto de la ekleziaj aferoj povas fariĝi tre lumigita kaj forte konstruanta, fronte al multaj nunaj diktatoroj.

N.B. Tiu laika aktivado ne estas ĥimero, sed ĝie antaŭe realiĝis, kaj hodiaŭ ĝi realiĝas en multaj lokoj.

Konkludo: la problemo de la reĝeco de laika montriĝas kompleksa. Tamen, ni povas, el tia prezentado de la elementoj, konkludi, ke ni, fratoj de Jesuo Kristo, povas realigi nian universalan kontribuon al la tuta savo de niaj kunvivantoj sur la tero.

Louis BOURDON o.p.

+++++

PERSONA PREPARO AL NIA KONGRESO EN FRANCHEVILLE

1. Ni atente relegas la temon: "Ĉu la Eklezio de Kristo kaj, sekve, ni esperantistoj, havas ankoraŭ valoron, eĉ gravan rolon, en la NUNA kaj ESTONTA MONDO?"

2. Ni preparas personan respondon, kiu ni prezentos sum la ĝenerala diskuto pri la temo. La ĉefaj demandoj estos:

- a) Ĉefaj karakteroj de nia nuna kaj venonta mondo?
- b) Ĉefaj karakteroj de nia nuna kaj venonta Eŭropo?
- c) Ĉefaj karakteroj de nia nuna kaj venonta Francio?
- d) kiel la Eklezio povas helpi la Mondon?
- e) kiel la Eklezio povas helpi Eŭropon?
- f) kiel la Eklezio povas helpi Francion?

3. Kelkaj utilaj legaĵoj (ni iom post iom konstruu nian bibliotekon)

- a) la vojoj de la Eklezio (Paŭlo la VI-a)
- b) "Homaranismo" - zamenhofa doktrino (SAT-broŝurservo)
- c) enkonduko de P-ro CHENU o.p. en "Une langue internationale pour le Monde et pour l' Eglise"

4. Slogano: "Legi por profunde preĝi;  
preĝi por klare scii;  
scii por forte agi!"

Louis BOURDON o.p.

+++++

AGADRAPORTO POR LA JARO 1991

Dum la jaro 1991, Franca Katolika Esperanto-Asocio daŭrigis sian agadon. La jara kongreso okazis en Amiens, je la fino de aprilo en la vasta domo de la Misiistoj, kie ni ricevis afablan akcepton. Dank' al la bonega laboro de nia amiko S-ro COLLEU, kiu zorge ĉion preparis kaj planis, ni pasigis fruktoplenajn tagojn, ne forgesante studi kaj diskuti la kongrestemon: "La esperantistoj kristanoj", sub la kompetenta gvidado de P-ro Bourdon.

Okaze de nia kongreso, mi sendis al la episkopo en Amiens diversajn dokumentojn por informi lin pri Esperanto kaj nia asocio. La episkopo tre afable dankis kaj sendis delegiton por saluti la kongreson.

Dank' al P-ro Bourdon, du informartikoloj pri Esperanto aperis en la revuo de la francaj dominikanoj.

Nia asocio petis sian enskribon en la Jarlibro de la franca katolika gazetaro, Jarlibro, kiu baldaŭ aperos.

La asocia bulteno regule aperis dank' al la akurateco de F-to Marmou, nia presisto, kaj de nia redaktorino, S-ino Vincent, kiu senlace kaj zorge preparas kaj tajpas la tekstojn.

Kvankam la nacia kongreso okazis en Boulogne-sur-Mer en la sama periodo, ni povis starigi diservon fare de P-ro GOUDE.

Nia membraro iomete kreskis (152 en 1990; 153 en 1991). Tiu eteta kresko venante post la malkreskoj de la pasintaj jaroj kuraĝigas nin daŭrigi nian agadon.

La Prezidanto.

+++++

GRAVAJ INFORMOJ POR LA KONGRESONTOJ

1) Pro ŝanĝoj en la Lyon-a bustrafiko, estas konsilinde uzi la subteran trajnon de Perrache ĝis Bellecour, kaj tie la buson 30 ĝis "La Plaine". La sama bileto validas por subtera trajno kaj buso.

2) Ne plu eblas havi fervojajn rabatilojn.

KOMITATKUNVENO DE LA 8-a DE FEBRUARO

14.00: malfermo. Ĉeestas P-roj Bourdon kaj Héroux, F-ino Preux, S-ino Vincent, F-to Marmou, S-roj Bessière, Colas, Despiney, Lafargue, Pons.

Observantoj: S-ino Lafargue kaj S-ro Royer.

Petis senkulpigon: S-ro Villeneuve, malsana.

Kongreso 1992: post vizito al malnova kvartalo, diservo sabato je la 17.30.

Kongreso 1993: 14/18/4 en hotelo Panoramic; po 140 F tage. Eblas forveturi la 19-an post matenmanĝo.

Kongreso 1994: P-ro Degrelle klopodas en sia regiono.

Bulteno: neniu rimarko.

Financoj: S-ino Vincent prezentas la raporton. (v. p. 4)

Informado: S-ro Bessière sendis dokumentojn al Kardinalo Decourtray.

I.K.U.E: neniu rilato eblas, pro la daŭra silentado de la IKUE-estraro.

16.00: fermo.

Protokolis: H. LAFARGUE

+++++

RENOVIGO DE 1/3 DE LA KOMITATO

Instrukcioj por la voĉdonado: respondu la demandojn 1 kaj 2 sur la voĉdonilo. Enmetu tiun ĉi (eventuale ankaŭ la rajtigilon) en koverton sen indiko. Enŝovu tiun ĉi en alian, kiun vi sendu al la sekretario, F-ino Preux, antaŭ la 10-a de aprilo. Dorso de tiu dua koverto, skribu vian nomon. Ne sendu ion plian, ĉar tiun koverton oni malfermos nur en Francheville, dum la kongreso!

+++++

RAJTIGILO

Mi, subskribinto (nomo kaj voknomo)

ne povas partopreni la kongreson en Francheville kaj rajtigas

reprezenti min kaj preni mian nomon ĉiujn decidojn por la bano de F.K.E.A.

Antaŭ la subskribo, skribu,

Dato kaj subskribo:

mane "Bon pour pouvoir"

+++++

VOĈDONILO

1. Ĉu vi aprobas la agadraporton? (v.p. 6) JES NE SINDETENO (1)

2. Ĉu vi aprobas la finanĉan raporton (V;p. 4) JES NE SINDETENO (1)

Renovigo de 1/3 de la komitato. Estas 4 kandidatoj por 4 postenoj. Vi rajtas forstrekii aŭ aldoni nomo(j)n, sed devas esti maksimume 4 nomoj entute.

P-ro DEGRELLE Roger

F-to MARMOU René-Jean

S-ro PONS Roger

S-ro VILLENEUVE Georges

(1) Forstrekii la senutilaĵojn.

N.B. Ĉu vi atente legis la instrukciojn por la voĉdonado?

KASISTINA ANGULO

Kiel kutime (ho ve! aĉa kutimo), multaj anoj ankoraŭ ne pagis sian kotizon por la nuna jaro. Notu bone, ke rajtas voĉdoni nur la pagintoj (ne la pagantoj). TUJ plenigu kaj sendu ĉekon al A.C.F.E. (v. ĉi sube). Ne atendu morgaŭ, vi jam estos forgesinta.

\*\*\*\*\*

LA JAGUARO

Ĝi sendiskute estas la reĝo de la venezuela arbaro. Tiu forta besto atakas kaj forrapigas ĉiujn aliajn bestojn, krokodilojn, cervojn, frakasante la nukajn vertebrarojn de siaj viktimoj. Plej ofte, tiuj ĉi fuĝas, kiam ili ekvidas la jaguaron. Sed la pekariroj, kiuj vivas grupe, ne fuĝas; ili grupigas stelforme kaj dentklakas por timigi la jaguaron. Se tiu ĉi tamen atakas, ili tiel kruele mordas ĝin, ke ĝi plej ofte forlasas la lokon. Nur unu besto ne timas la jaguaron; tiu estas la testudo, ĉar la dentoj de la jaguaro ne estas sufiĉe fortaj por frakasi la karapacon de la testudo.

\*\*\*\*\*

ENHAVO

- |  |                                   |
|--|-----------------------------------|
| 1. La mot du président                             | Financa raporto                   |
| 2. Pardonu nin, Sinjoro Ste-Anne de Kergonan       | 5. La kristano esperantisto       |
| 3. Laŭdo kaj propeto La infano de la lago "Perkoj" | 6. Persona preparo al la kongreso |
| 4. Recenzo   | Agadraporto                       |
|  | 7. Protokolo komitatkunveno       |
|  | Rajtigilo kaj voĉdonilo           |

\*\*\*\*\*

KOTIZTABELO 1992

I.K.U.E. kun "Espero Katolika" 150 F  
Peranto: P-ro R. DEGRELLE c.c.p. NANCY 2 555 38 L.

-----

A.C.F.E. kun "Franca Katolika Esperantisto" - unuopulo 40 F  
geedza paro 50 F  
infano ĝis 16-jara, pastro, religiulo(in)o 20 F  
bonfaranto 200 F

-----

U.F.E. kun "Revue Française" kaj "E° Actualités" 250 F  
U.E.A. kun "Esperanto" kaj Jarlibro 260 F

Association Catholique Française pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.

\*\*\*\*\*

Dépôt légal: 1er trimestre 1992 !! Polycopié pae l' A.C.F.E.(enregistrée le 6 !! mai 1977 à la sous-préfecture de Saumur !! sous le n° 2523 bis-J.O. 23/05/1977)  
C.P.P.A.P. n° 62 532. !! au prieuré St-Martin  
Directeur: Albert BESSIERE !! 77610 LA HOUSSAYE EN BRIE  
Directeur-délégué: !! FRANCE  
René-Jean MARMOU